


VOJO AL LA ĈIELO

Desur Andoj ĉielen

Michał Tomaszek naskiĝis la 23-an de septembro 1960 en Łękawica proksime al Żywiec (Pollando). Ek de la jaro 1975 li studis en Malplialta Porpastra Seminario de Franciskanoj. La 23-an de majo 1987 li sacerdotiĝis. Sekve li plenumis animzorgan servon en paroĥo Pieńsk apud Zgorzelec, li estis kateketisto. Al Pariacoto en Peruo li alveturis en julio 1989.



Zbigniew Strzałkowski naskiĝis la 3-an de julio 1958 en Zawada apud Tarnów (Pollando). En la jaro 1978 li finis Mekanikan Teknikumon en Tarnów. En la jaro 1979 li eniris ordenon de franciskanoj. Li sacerdotiĝis la 7-an de junio 1986. Dum du jaroj li estis vicdirektoro de la Malplialta Porpastra Seminario en Legnica. Al Pariacoto li forveturis novembre 1988.

La patroj Michał Tomaszek kaj Zbigniew

Strzałkowski, franciskanoj konventulaj, estis la 5-an de decembro 2015 altigitaj altaren. Ilia beatigo okazis en la perua urbo Chimbote. Ĉi tiuj ambaŭ polaj misiistoj praktikis



La katedralo en Chimbote

animzorgan servon en la paroĥo Pariacoto en Anda montaro. La 9-an de aŭgusto 1991 ilin murdis komunistaj partizanoj el organizacio Sendero Luminoso (Brilluma Vojo). Kune kun la poloj estis ankaŭ beatigita itala pastro Alessandro Dordi. Tiu ĉi itala misiisto laboris en la paroĥo Rinconada, kaj estis pafmortigita fare de teroristoj el tiu sama organizacio la 25-an de aŭgusto 1991.


Opio por la popolo

Luis Barbarén, emeritigita episkopo de Chimbote, kondukis la beatigan proceson de la polaj franciskanoj. Li devis esplori, ĉu ili estis murditaj pro malamo kontraŭ la kredo,



La urbo Callao, en kies malliberejo travivas ĝismortan punon ĉefkomandanto Abimael Guzmán

kio estis nepre necesa kondiĉo por agnoski la patrojn Tomaszek kaj Strzałkowski kiel veraj martiroj. Li do forveturis al la bazloko de la perua milita ŝiparo en Callao, kie troviĝas en la malliberejo punkondamnitaj estroj de la Brilluma Vojo, kaj inter ili la 81-jaraĝa ĉefkomandanto de la grupiĝo Abimael Guzmán, la eksprofesoro de la filozofio ĉe la universitato de Ayacucho. Li estis arestita en la jaro 1992 kaj punita per ĝismorta mallibereja restado.



Ĉefkomandanto de teroristoj Abimael Guzmán

„Mi disdonis la bibliojn kun speciale signita fragmento pri la Kaina krimo: »Kain mortigis sian fraton. Dio punis lin pro tio, sed lasis lin vivi. Vi ankaŭ mortigadis viajn fratojn. Vi estas punitaj, sed oni ne mort-punis vin. Prikonsideru tion ĉi«, mi diris al ili“ – rememoras la episkopo Barbarén. „Tiam alproksimiĝis al mi Guzmán, petanta min pri la intima interparolo. Ni iris aliloken. »Ekscelenco, mi ne povas dormi, mi estas profunde emociita kaj deprimita. Mi volas pardonpeti pro tio, kion mi faris, mi volas pardonpeti la Eklezion kaj la socion.




“Presidento” Gonzalo propagandanta komunismon

La decido pri la apliko de la armita batalo estis eraro«, li diris. Ni interparolis sufiĉe

longe. Finante mi demandis lin senpere: »Profesoro, bonvolu diri al mi, kial vi ordonis mortigi tiujn misiistojn? Ĉu estis iuj kaŭzoj politikaj aŭ sociaj de tiu decido aŭ la kaŭzo estis malamo al religio?« »Malamo al religio. Mi tiam pensis, ke tiel fari estas bezono, ĉar la religio estas opio por la popolo. Mi tiel tiam konsideris, kaj tial mi nun petas pri la pardono«, li respondis.

Tiel mortas la servaĉuloj

Estas la 9-a de aŭgusto 1991, proksimiĝas la 20-a horo. La fratulino Berta Hernandez el la Kongregacio de la Servantinoj de la Plejsankta Koro de la Sinjoro Jesuo iras rapidpaŝe al la preĝejo en Pariacoto. Ŝi estas forte maltrankviligita. Antaŭ momento iu diris al ŝi, ke li vidis surstrate de la urbeto viron, kiu asociiĝas kun la Brilluma Vojo. „Ĉe ni la homoj diras nenion senbezone. Dum la lastaj centjaroj ili ellernis timon kaj singardemon. Sufiĉas, ke iu diros al vi: »Estas trankvilege, nu eble nur la hundoj nokte iomete bojas«, do tion estas necese kompre-



La preĝejo en Pariacoto

ni kiel gravan averton. Se iu atentigis min tiamaniere, tio ĉi signifas, ke li scias kun certeco aŭ almenaŭ li konjektas, ke la banditoj planas atakon. Kaj se li tion diris al mi, tio signifas, ke la danĝero minacas la pastrojn, ĉar estas konate, ke la komunistoj malamas la pastrojn,“ – rememoras la fratulino Berta. „Kaŝu vin, por ke ne estu malfrue,“ – ŝi vokis al la pastro Zbigniew. „Tio ne estas ebla, ĉar post momento komenciĝos la Sankta Meso,“ li respondis trankvile. Post nelonga momento alvenis la patro Michał. „Vi ja venis por



Sac. Michał Tomaszek kaj Zbigniew Strzałkowski

partopreni la Sanktan Meson, ĉu ne? Nu do eniru kun ni“ – mi ekaŭdis. Dum la Meso mi ne povis koncentriĝi, la tutan tempon mi observis la pordon, ĉu subite ne malfermos ĝin la homoj kun pafiloj. Michał legis evangelion, Zbigniew predikis, kvankam mi opiniis, ke en tia situacio la prediko malestos. Li parolis pri la amo kaj paco,“ – rememoras fratulino Berta.

La teroristoj armitaj kaj kun la maskoj surviŝaĝe aperis kelkajn minutojn post la meso-fino. „Ĉiuj monaĥoj devas ĉi tie arigi,“ ordonis unu el ili. Krom du polaj pastroj en Pariacoto estis ankoraŭ du postulantoj, do la kandidatoj al la ordeno. „Nur ni ĉi tie estas pastroj, do se vi iun serĉas, estas nur ni du,“ – diris pastro Zbigniew. La teroristoj, post momento de hezitado, rezignis serĉi la postulan-



tojn. Ili ordonis al la pastroj enaŭtomobiliĝi. En tiu ĥaoso enaŭtomobiliĝis ankaŭ la fratulino Berta. La daŭrigon de la okazaĵoj do ni konas al ŝia raporto.

„Unu el la teroristoj komencis kvazaŭ pridemandadon... Nu, jes, vi estas aliancanoj de CIA, vi trompas la popolon,“ li diris. Mi memoras, ke Michał diris nur: „Amiko, se mi faris iun eraron, do diru al mi kian?“ kaj estis silento. Poste la teroristoj diris, ke ili humiligas popolon disdonante la manĝaĵojn, kiun produktas la imperialistoj,“ – rakontas Berta.

En iu momento la teroristoj konsideris, ke la monaĥino estas por ili malbezona. Ili ŝin forĵetis el la aŭtomobilo, eĉ ne haltinte. Poste ili alveturis sub la loĝejon de la Pariacota vokto Justino Leono Mazo. Ili entiris lin perforte en aŭtomobilon kaj ekveturis plu.



Elveturinte el la vilaĝeto ili forbruligis post si la ponton, por ke neniu ilin kuratingu.

En la loko nomata Pueblo Viejo (Malnova vilaĝeto) ili mortpafis ambaŭ franciskanojn kaj la vokton. Al la vestaĵo de Zbigniew ili alkrōis paperfolieton kun teksto: „Tiel mortas la servantoj de imperialismo.“

Kiel Kristo

„Al mi ĉiam aperumas la komparaĵoj de la cirkonstancoj pri la morto de la misiistoj kun la martireco de Kristo. Oni kaptis ilin post la Sankta Meso kiel Jesuo post la establo de la Eŭkaristio. Krome, tiu peto de la patro Zbigniew, por ke la teroristoj lasu liberaj la aliajn franciskanojn, rememoras la vortojn de Jesuo en momento de lia kapto. Same la demando de la patro Michał en la aŭtomobilo veturiganta ilin por mortigi similas al la de Jesuo ĵetita demando dum la proceso en domo de la arkipresbitero“



stranga homo, kiu kondutas tiel, kvazaŭ li ilin spionus. Post la morto de la patroj Zbigniew kaj Michał, dum ilia sepulto, li ludis per gitaro. Poste montriĝis, ke ĝuste li estis tiu, kiu indikis al la teroristoj la konvenan momenton kaj lokon por ataki ilin.



La konfido estis senmaskigita, sed la senperaj kaŭzintoj de la krimo kaŝiĝis evitante la verdikton de la justico.“

Pariacoto estas negranda loko, ĝi sume havas ĉirkaŭ du mil loĝantojn, kvankam la tuta paroĥo estas granda preskaŭ kiel polaj Tatroj kune kun t.n. Podhale. Tamen la homoj konas ĉiujn, kaj certe iuj povus indiki tiujn, kiuj simpatiis kun la komunistoj, kaj tiam certe la murdistoj estus kaptitaj. Tamen



tiel ne okazis. Por ekkompreni la situacion, oni devas scii, ke la Brilluma Vojo ne estis malaprobata fare de ĉiuj peruanoj. En la enketado realigita en la jaro 1991, do tiam, kiam la teroristoj estis la plej fortaj, kaj faris la plej terurigajn krimojn, eĉ 17 procentoj de la loĝantoj de Peruo deklaris, ke ili aprobas la starpunkton de la Brilluma Vojo. Do ne estis tiel, ke al la vilaĝetoj perforte eniradis la armitaj fremduloj, malaprobataj de ĉiuj.



Kune kun sac. Michał kaj Zbigniew estis beatigita ankaŭ sac. Alessandro Dordi (maldekstra)

Ofte la plej proksimaj najbaroj aŭ parencoj povis montriĝi la teroristoj.

La hunvejbinoj el Ayacucho

Al ni estas hodiaŭ malfacile imagi, ke kiam en Eŭropo la komunismo tute estis „bankrotanta“ kaj la Sovetunio dispartiĝis,



kaj en Ĉinio oni donadis al „muzeo“ la ideojn de Mao, en la malproksima Peruo, en unu el la plej grandaj ŝtatoj de Sudameriko, la ruĝaj revolucianoj ĵus preparadis sin enkonduki „la proletaran diktaturon“. Tiun senduban anarkismon oni tamen komencis pretigi



La katedralo en Ayacucho

jam en sesdekaj jaroj de la dudeka jarcento. En la universitato en Ayacucho la ĥarisma lekcianto de filozofio Abimael Guzmán arigis ĉirkaŭ si la grupeton de la studentoj, al kiuj li rakontadis pri la ekspluatado de la laborantaj amasoj fare de la burĝaro kaj pri la komploto fare de la imperialistoj, kiujn oni devas elimini. Por li la modelo estis en la kultura revolucio, enkondukita en Ĉinio fare de Mao en la jaro 1966. La blinde obeemaj al la diktatoro gvardianoj, t.n. hunvejbinoj, tiam en Ĉinio, niigis perforte ĉiujn manifestojn de la sendependa pensrimedo. Tiam Guzmán komencis sin prepari al la armita batalo, kaj li ĉirkaŭigis sin per pli kaj pli granda grupo de la propraj „hunvejbinoj“. Kiel sian moton li ripetadis la frazon de José Carlos Mariátegui



José Carlos Mariátegui

(1894-1930), perua filozofo kaj komunisto: „El marxismo-leninismo es el sendero luminoso del futuro“ (marksismo-leninismo estas la brillumata vojo de la futuro). Sian gvardion li nomis do „Sendero Luminoso“ (Brillumata Vojo). Li mem komencis agi en la sekreta movado sub la pseŭdonomo Presidente

Gonzalo. Baldaŭ liaj ambicioj kreskis eĉ tiom, ke li nomis sin la kvara granda mark-sisto en la historio, kaj la oficiala ideologio de la Brilluma Vojo fariĝis „marxismo-leninismo-maoismo y pensamiento Gonzalo“ (marksismo-leninismo-maoismo kaj la ideo de Gonzalo).



En kio konsistas la „ideo de Gonzalo“? Mallonge dirante, ĝi estis la aĝustigo de la komunisma revolucio al la situacio en Peruo. La montaj departamentoj de tiu ĉi ŝtato, tiaj, kiel ekzemple Pariacoto estas loĝigitaj per tre malriĉa terkulturista civito. La vilaĝanoj ne scipovas depostuli siajn rajtojn, ĉar ili ne formas la realan politikan forton, la plibonigo de ilia vivo ne estas prioritato por kiu ajn ekzistanta en Peruo politika partio.

La centra povo, krom tio, tre malvigle kontrolas tion, kio okazas en la altaj montoj, kie eĉ ne ekzistas ordigitaj vojoj. Niaj misiistoj al kelkaj vilaĝetoj en sia paroĥo devis rajdi ĉevale dum la tuta diurno. La reprezentantoj de la lokaj povoj aŭ eĉ polico penetras



la lokojn tre malofte. Nenia strangaĵo, ke tie regas la malobeo de la leĝoj. La vera plago estas la ŝtelantoj de la brutaro.

Do Presidente Gonzalo prilaboris la tak-

tikon permesantan akiri la favoron de la loka loĝantaro. Antaŭ fino de la sepdekaj jaroj la Brilluma Vojo komencis intense batali



Patro Zbigniew perĉevale vizitanta vilaĝon

kontraŭ la ŝtelantoj de la brutaro. La agon de mortigado ili prezentis kiel la manifeston de la „popola justeco“. La movado jaron post jaro akiradis ĉiam pli kaj pli da simpatiuloj, kiuj komencis akcepti eĉ tion, ke la partizanoj mortpafas ankaŭ la policistojn kaj voktojn de la vilaĝoj pro iliaj „malrapidemo kaj tro malvigla zorgo pri la interesoj de la popolo.



Patro Michal okupiĝas pri la infanoj

Tamen kiam la revolucio ĉirkaŭprenis unu trionon de la perua surfaco, Abimael Guzmán eksentis sin esti jam tiom forta, ke li forlasis la taktikajn komplikaĵojn. En majo 1980 li deklaris, ke jam venis la tempo renversi la ŝtatajn povojn kaj komenci la socialistan revolucion. La movado jam kalkuliĝis je 10 mil partizanoj.

Preskaŭ kiel en la ĉielo


„En la periodo de la plej fortaj bataloj, la polaj franciskanoj venis en Peruon. Ili engaĝiĝis tre forte en la vivon de la loka

civito. Patro Zbigniew multe agadis pri la malsanuloj. Li eĉ penadis ilin kuraci. Patro Michał ekokupiĝis pri la infanoj kaj junularo. La loĝantoj ilin ege amis kaj estimis. Mi mem tion vidis, kiam mi venadis vizitade“ – rakontas la episkopo Barbarén.



Patro Jarosław Wysockański

Ĉi tion vidis ankaŭ la teroristoj, kiel asertas patro Jarosław Wysockański, samfrato de la pastroj Michał kaj Zbigniew, dum la misio en Peruo (li saviĝis nur tial, ĉar en la momento de ilia morto li libertempis en Pollando), la franciskanoj iĝis por la teroristoj konkurenco. La komunistoj deziris eduki la homojn akorde kun sia ideologio. Eĉ en Pariacoto mem ili intencis fondi la lernejon kaj instrui la marksismon-leninismom. La plej akra forto de iliaj atencoj estis direktita kontraŭ la rep-




Modelo por ili estis revolucio en Túpac Amaru

rezentantoj de la lokaj elitoj. Al la ordinaraj homoj ili prezentadis sin kiel zorgantoj kaj bonfarantoj. Ili esperis akiri la amasan apogon. Sed tiel ne okazis. La homoj ne volis apogi la partizanojn, ili nur ariĝis ĉirkaŭ la misio eĉ la valoroj deklarataj de la misiistoj. Guzmán tiam finorientiĝis, ke la plej granda minaco al la teroristoj estas la Eklezio. Komencis multiplikiĝi la atakoj kontraŭ la paroĥojn. La episkopo Barbarén mem travivis du atencojn kontraŭ lia vivo.

La malbono, kiun la teroristoj dissemadis ĉirkaŭ si, renkontiĝis ne nur kun la

reago de la popoloj, sed ankaŭ kun la spontanea protesto de la vilaĝa loĝantaro. Aperis grupoj de armitaj vilaĝanoj, nomitaj rondas (patroloj), kiuj memdecide spuris kaj mortigadis partizanojn. La teroristoj respondis per „pacigado“ de la tutaj vilaĝoj. Al la bataloj, krom la soldataro, Brilluma Vojo kaj rondas aliĝis la maldekstrularaj partizanoj el la Revolucia Movado sub nomo de Tupaca Amaru, kiuj batalis kontraŭ la registaro kaj



ankaŭ kontraŭ la Brilluma Vojo. Oni provizore kalkulis, ke en la bataloj pereis ĉirkaŭ sepdek mil homoj.

La milito tamen okazadis malproksime de Pariacoto. La patro Michał Tomaszek en unu el siaj leteroj al la familio skribis: „Eble en Pollando oni multe parolas pri la terorismo en Peruo. Ĝi estas vero, sed la teroristoj ne serĉas kontakton kun la pastroj, do ni vivas tiel, kvazaŭ ili ne ekzistus. Estas trankvilete, senkonflikte, preskaŭ kiel el la ĉielo.“



La beatuloj Zbigniew kaj Michał propetu por ni!

El la pola katolika semajngazeto Gość Niedzielny (Dimanĉa Gasto) 49/2015 tradukis Andrzej Kler, Anglujo